


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, internacia lingvo



Parada marŝo tra la malnova urboparto de Herzberg en la 64-a IFK

4

2012

56-a jarkolekto



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado
en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt
Rákos u. 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 1500
al eksterlanda adreso: EUR 10

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős:

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület
Misztótfalusi Nyomdaipari Kft.

Felelős vezető: Soósné Pálfalvai Adrienn

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO

2-a kovrilpaĝo: **I. Gulyás:** Estrarkunsido de MVEE

49. **I. Gulyás:** Denove pri datrevenoj

50. **I. Gulyás:** Estrarkunsido de IFEF

51. **J. Halász:** 13+1 demandoj (István Gulyás)

60. **J. Patay:** János Arany

62. **J. Patay:** Je la memoro de Donát Bánki

63. **J. Patay:** Fakaj Informoj

3-a kovrilpaĝo: Spiritaj desertoj

ESTRARKUNSIDO DE MVEE

La estrarkunsido de nia asocio okazis la 17-an de novembro en Budapeŝt. Partoprenis ĉiuj estraranoj, kaj la membroj de la Kontrola Komitato.

La estraro traktis laŭ tiuj tagordoj, kiujn la sekretario antaŭ la kunsido dissendis.

Unue la prezidanto taksis la nunjaran laboron. Li akcentis, ke okazis kelkaj ĝojplenaj eventoj, kiel la 44-a Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo, kiu bone sukcesis, la regule aperintaj fakaj revuoj HFM kaj IF, kiuj kaj en Hungario kaj en la tuta Eŭropo, eĉ ekster Eŭropo rikoltis grandajn rekonajn ktp. Kelkajn temojn ni devas ekzameni kaj plibonigi, kiel la realigo de la laborplano, la finpreparo de la historio de nia asocio, la instruada agado, la elekto de la delegitoj por la sekva ĝenerala kunsido de HEA, kaj por la IFEF kongreso ktp.

La prezidanto raportis pri la internacia agado de la fervojistaj esperantistoj. Li konigis pri la 64-a IFEF-kongreso, okazinta en Herzberg, kaj proponis partopreni en la sekva 65-a IFK, okazonta en la franca urbo Bordojo. Li parolis pri la kunlaboraj interkonsentoj kun UMEA, ISAE kaj ILEI, pri la agadplano kaj la estrarkunsidoj de IFEF, kaj pri la redaktora laboro por la revuo „Internacia Fervojisto”.

Okazis traktado pri la financaj temoj, kaj pri la 2013-jaraj planoj de nia asocio. La estrarkunsido proponis por plibonigi la rilatojn inter la estraro kaj la fakgrupoj, kontroli la membronombrojn de la fakgrupoj kaj la membroasocioj, raporti pri la kursoj, kaj elekti oficialajn komitatanojn por IFEF kaj HEA.

Mi esperas, ke ĉi tiu estrarkunsido helpas plibonigi nian agadon, kaj montras la ĝustan vojon por pli efika agado en la kadro de la fervojista Esperanto-movado.

István Gulyás

DENOVE PRI DATREVENOJ

La kuranta jaro, kaj la jaro 2013 denove abundas je gravaj datrevenoj. Ĉiam estas ĝojplena evento, kiam ni povas rememori pri niaj antaŭuloj, kiuj helpis la rekonon de Esperanto en la tuta mondo, en la medio de fervojo. Tiuj esperantistoj senlace kaj entuziasme agadis en la kadro de Esperanto, kaj ili donis al ni ekzemplon por efike labori per Esperanto por Esperanto.

La plej grava evento estas en la nuna jaro la **125-jara** datreveno de **Esperanto**. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis la lingvo „Esperanto”, kiam L. L. Zamenhof presigis kaj dissendis la „Unuan libron” de Esperanto. En la pasintaj 125 jaroj multmilionoj da personoj lernis kaj alproprigis la lingvon, eĉ estiĝis la Esperanto-movado. Tiu movado ne estas nur simpla movado, sed por multaj esperantistoj tio iĝis je vivoformo eĉ vivmaniero. Zamenhof donis al la homaro tiun ideon, per kio multaj homoj atingis interkonsenton, pacemon, amikecon kaj reciprokan respekton. Por solene kaj inde festi la 125-jaran datrevenon de Esperanto, ĉiuj Esperanto-organizaĵoj aranĝis kongresojn, konferencojn, ekspoziciojn, kursojn kaj aliajn programojn. Ankaŭ ni fervojistaj esperantistoj festis tiun gravan datrevenon okaze de nia Internacia Kongreso en Herzberg.

Ankaŭ en la kuranta jaro la alia grava evento estas por ni hungaraj esperantistoj, ke antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Tibor Székely** de hungaraj gepatroj. Li vivis en Slovakio, Rumanio, Montenegro, Serbio, Kroatio eĉ en Sudameriko. Li vojaĝis tra la mondo, trairante centon da landoj sur ĉiuj kontinentoj. Li agis sur la kampoj de geografio, ĵurnalismo, etnologio, muzeologio, li estis literaturisto, verkisto, poligloto, politikisto, ĵurnalisto eĉ ne lastvice elstara esperantisto. La Eŭropa Esperanto-Unio proklamis la jaron 2012: „Jaro de Tibor Székely”. En tiu kadro dum nia Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo, okazinta en la urbo Szeged, la vidvino de Tibor Székely detale parolis pri sia edzo, kaj lia agado. Ni hungaroj estu fieraj pro la hungardevena eminenta homo.

En la jaro 2013 multaj eminentaj fervojistaj esperantistoj havus 100 jaraĝojn, sed bedaŭrinde ĉiuj jam mortis:

André Blondeaux franca esperantisto, kiu en 1954 tradukis 5000 terminojn el la „Lexique Technique Ferroviaire”, kaj en 1978 kompilis

bele binditan „Fervojan Leksikonon” en franca-esperanta. Li estis la plej entuziasme agema membro de la terminara laboro de IFEF, kiu ricevis la plej valoran distingon „Honora membro de IFEF”. Pro la multflanka agado en 1971 li ricevis la distingon „Ora medalo de FISAIC”.

Joachim Giessner estas la plej konata kaj fama germana esperantisto. En 1953 li fariĝis sekretario de GEFA, kaj li sukcesis lanĉi la Esperanto-klarigon en la germana fervoja horaro, per tiu ekzemplo la ceteraj fervojoj unu post la alia enkondukis tiun metodon. Li estis la prezidanto de GEFA ekde 1957 ĝis preskaŭ lia morto. Li estis IFEF-prezidanto inter 1968 kaj 1990. Kiel prezidanto li havis multajn eblecojn por agadi laŭ tio, kion oni nomas la „interna ideo” de Esperanto, do praktiki tiel, kiel Zamenhof volis. Li patoprenis en pli ol 50 IFEF-kongresoj seninterrompe. Li estis tiu entuziasma persono, kiu instigis kaj helpis orientlandajn organizaĵojn aliĝi al IFEF, eĉ al FISAIC. Li kontinue vizitis la landajn asociojn de IFEF, kaj helpis ilin per siaj konsiloj. Li verkis nenombreblajn artikolojn, gvidis kursojn, prelegis pri fakaj kaj literaturaj temoj, tradukis ĉiuspecajn kantojn kaj poemojn, eĉ librojn, redaktis revuojn kaj la historion de IFEF. Lian agadon longe ni povus vicigi, kaj ni povas konstati, ke li vere estas neanstataŭigebla persono por la fervojista Esperanto-movado. Li ricevis multajn distingojn, inter aliaj: „FISAIC Ora Medalo”, „Honora Prezidanto de IFEF”, „Honora Membro de UEA”.

Germano Gimelli itala esperantisto estis la motoro de la itala fervojista Esperanto-movado. Li redaktis dum pli ol 30 jaroj la revuon „Informa Bulteno”, kunlaboris en la Terminara Komisiono de IFEF, kaj dum longaj jaroj aktive partoprenis en la komitata laboro de IFEF. En la jaro 1977 en Swanwick dum la 29-a IFEF-kongreso li ricevis la distingon

„Honora Membro de IFEF”. En 1992 li entreprenis por tri jaroj la taskon fari la Korespondan Servon. Li estas unu el la „grandaj kaj famaj maljunuloj” de la fervojista Esperanto-movado.

Jaap Labordus ankaŭ apartenas al la „grandaj maljunuloj”, ja li estis dum pli ol 30 jaroj la prezidanto de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, kaj membro de la Terminara Komisiono de IFEF. Eĉ dum tri jaroj, inter 1964 kaj 1967 li estis la ĉefkomitatano de IFEF. En la jaro 1977 pro entuziasma agado li ricevis distingon „Honora Membro de IFEF”, kaj en 1981 li estis „Honorito per FISAIC-medalo”.

László Zseni estis la iama kasisto kaj administranto de nia asocio. Li ordigis la membro-registradon de la hungaraj fervojistaj esperantistoj, kiun li daŭre devis adapti al la ŝanĝigantaj cirkonstancoj. Li katalogis nian bibliotekon, kaj manipulis la kason. Li kontinue interrilatis kun la fakgrupoj, faris kaskontrolon eĉ instruadon pri financaj aferoj. Li aranĝis la ekspedon ne nur la leterojn, sed ankaŭ nian fakan revuon HFM. Li estis ĉiam retrovebla, kaj ĉiam helpis al la laboro de la prezidanto. Do li estis „faktoto”, kaj li estis preskaŭ nemalhavebla. Lia morto donis al nia asocio grandan perdon.

Ciu ĉerpu ideon el iliaj ekzemploj!

István Gulyás

ESTRARKUNSIDO DE IFEF

En la nuna jaro la aŭtuna estrarkunsido de IFEF okazis la 4-an kaj 5-an de oktobro en la franca ĉefurbo Parizo. En la kunsido partoprenis ĉiuj estraranoj, la ĉefkomitatano, la membro de la Redaktora Komisiono Jean Ripoché, kaj parte flanke de FISAIC Anna Abelovská kaj la prezidanto de la UAICF (la franca landa asocio de FISAIC) Georges Wallerand.

La estraro detale traktis 10 tagordpunktojn, kiuj temoj estas gravaj por plibonigi la agadon de IFEF.

La estraranoj ekzamenis la situacion de la preparlaboro de la 65-a IFEF-kongreso, okazonta en la franca urbo Bordojo inter la 4-a kaj 11-a de majo 2013. La preparlaboro daŭras senprobleme.

La estraro detale traktis la organizajn aferojn. En tiu kadro la estraranoj ekzamenis la ĝis nun alvenintajn kongresproponojn.

La estraro ekzamenis la evoluon de la terminara kaj faka agadoj, konfirmis la venontajn IFEF-kongresojn en Francio, poste en Italio, kaj traktis pri la eventualaj landoj de la sekvaj kongresoj.

La kasisto informis la kunsidon pri la ĝenerala situacio de la financaj aferoj. La estraro konstatis, ke la financa stabileco estas trankviliga.

La estraro traktis la redakciajn aferojn, kaj akceptis la raporton de la redaktoro kaj la membro de la Redaktora Komisiono. La estraro esprimis sian kontentecon pri la enhavo kaj aspekto de la revuo „Internacia Fervojisto”, eĉ pro la eldono de ses numeroj po jare.

La trijara laborplano enhavas konkretajn taskojn por mem la IFEF, por la landaj asocioj, por la komisionoj kaj komisiitoj.

La kasisto kun ĝojo anoncis, ke aliĝis al IFEF fervojistaj esperantistoj el Israelo, Belgio kaj



Sacré Coeur en Parizo el la fenestro de la kunvenejo

Svedio – kiel individuaj membroj – eĉ fondiĝis la Kuba Fervojista Esperanto-Sekcio.

La rilato kun FISAIC ne ŝanĝiĝis, ĉar kelkaj landaj FISAIC-organizaĵoj tute ne subtenas Esperanton. S-ro Wallerand iomete detale konigis pri la lasta kunsido de la prezidio de FISAIC, kaj esprimis sian esperon, ke tiuj landoj – kiuj forlasis la organizon FISAIC pro financaj problemoj – revenos al tiu.

La estraro kun ĝojo konstatis, ke la kunlaboro kun SAT, UMEA, ISAE kaj ILEI bone evoluas.

Fine la estraro decidis pri la loko kaj dato de la printempa estrarkunsido, kiu okazos en Italio, en la urbo San Benedetto, kie la Itala Fervojista Esperanto-Asocio planas organizi la 66-an IFEF-kongreson en la jaro 2014.

István Gulyás

13+1 DEMANDOJ

En nia faka revuo HFM, ekde 1989 de tempo al tempo aperas la riportserio, titolita „13+1 demandoj”. En ĉi tiu serio ĝis nun troviĝis du konstantaj faktoroj: unue el ili estas mem la revuo HFM, kaj la alia la persono de la demandanto s-ro István Gulyás. Ni povis sperti, ke li tre bone kapablas demandi. Nun eksterordinara evento okazas. Ni estis scivolaj pri tio kiel li respondas. Pri tiu evento ekzistas hungara popola sentenco. Nun okazas tiu evento, kiam ”oni pendumas la ekzekutiston”. Tamen, senŝerce, s-ro István Gulyás estas elstara kaj vaste konata figuro de la landa kaj internacia movado, lia persono inde konformas al vico de la personoj demanditaj ĝis nun en la riportserio.

1./ Kiel kaj kiam vi ekkonis Esperanton?

Ŝajnas al mi, ke neniu povas eviti sian sorton. Antaŭ pli ol 20 jaroj mi komencis tiun demando-respondo-serion kun Flóra Szabó-Felső (kiu estis la sekretario de UEA), poste sekvis I. Bácskai, I. Ferenczy, K. Fajsz, É. Farkas-Tatár, A. Pechan, Á. Máthé, J. Giessner, O. Prinz, H. Schindler, I. Pethes, J. Patay, kaj G. Pál. Do mi faris intervjuon kun la plej eminentaj esperantistoj. Sed la vico ankoraŭ ne finiĝis, ĉar multaj hungaraj kaj eksterlandaj fervojistaj esperantistoj mankas el tiu serio. Se mi havus sufiĉan tempon kaj spacon en nia faka revuo Hungara Fervojista Mondo, mi kontinue daŭrigus tiun serion. Nun la estraranoj de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio pere de József Halász instigis min respondi al la kompilitaj demandoj. Tiu instigo kaj peto estas honoro por mi, do mi entreprenis tiun inviton al la intervjuo.

Kiel mi iĝis esperantisto? En la jaro 1958 mi laboris kiel fervojista inĝeniero en la urbo Hatvan, kiu situas 60 km-ojn for de Budapeŝt. Mi ĉiutage vojaĝis per trajno inter mia loĝejo kaj Hatvan. Dumvoje mi ĉiam legis ĵurnalon aŭ iu beletran libron, eĉ kelkfoje mi kartludis kun amikoj. Foje mi vojaĝis kun iu eksterordinare grandstatura fervojisto, kiu laboris en la Fervojdirekcio de Budapeŝt, kaj li venis al Hatvan revizii la laboron de mia oficejo. Li estis Szilárd Bálint, eminenta

esperantisto, kiu instruis la lingvon en la Fervojdirekcio. Li demandis: „Kial vi malŝparas vian tempon por kartludi, aŭ legi ĵurnalon? Kial vi ne lernas la lingvon Esperanto?” Mi jam aŭdis tiam pri Esperanto, kaj mi diris: „Mi jam parolas iomete bone la germanan lingvon, kaj mi ne bezonas alian lingvoscion.” Tamen li transdonis al mi Esperanto-lernolibron fare de Julio Baghy, kaj li proponis trastudi tion. Mi legis la unuan lecionon, kaj mi tuj povis traduki tiun, ja mi lernis la latinan lingvon en la mezlernejo dum ok jaroj. Poste ĉiutage mi studis la lernolibron, eĉ mi aĉetis Esperanto-vortaron, kaj post kelkaj semajnoj iomete mi bone povis traduki aliajn Esperanto-tekstojn. Mi aliĝis al progresanta Esperanto-kurso, kaj post unu jaro mi ekzameniĝis ĉe Julio Baghy el



István Gulyás

la lingvo. Li laŭdis min, kaj li proponis al mi por aliĝi al la fervojista Esperanto-movado. Ekde tiam mi estas membro de la tiama Fervojista Fakoj de la Hungara Esperanto-Asocio, pli poste la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio.

2./ Kie kaj kiel vi agadis sur tereno de Esperanto, respektive pere de ĝi sur tereno de UIC kaj FISAIC?

Post mia bazgrada ekzameno mi intense lernis la lingvon, kaj post unu jaro mi akiris la mezgradan kvalifikon, eĉ mi komencis instrui



Sur la podio dum la inaŭguro de la 34-a IFK en Balatonfüred

la lingvon ĉe fervojistaj entreprenoj, institutoj kaj hospitaloj. Mi partoprenis en la 14-a IFEF-kongreso kiel helpanto. Pro mia grava laboro en la Budapeŝta Fervojdirekcio, kaj poste en la Generaldirekcio de MÁV, eĉ pro mia studado en la Ekonomia Universitato por akiri la duan diplomon, mi devis moderigi, eĉ forlasi mian Esperanto-agadon. En la jaro 1975 vizitis min D-ro István Bácskai, kaj proponis al mi daŭrigi mian agadon en la kadro de la internacia tereno de la fervojista Esperanto-movado.

Pro mia grava posteno en la Generaldirekcio mi multe devis veturi kaj trakti eksterlande, mi pensis, ke mi povos utiligi la lingvon Esperanto, do finfine mi transprenis tiun taskon. Nia

Esperanto-organizo en 1977 komisiis min partopreni dum la IFEF-kongresoj kiel komitatano, kiun postenon mi okupis ĝis 1989. La komitato de IFEF en 1980 elektis min „Komitatano A de IFEF ĉe UEA” kaj en 1988 mi iĝis vicprezidanto de IFEF. Ambaŭ postenon mi forlasis en 2010. Ekde 1985 mi estas la prezidanto de la Hungara Fervojista

Esperanto-Asocio.

Mi partoprenis ĉiujn IFEF-kongresojn ekde 1978 kaj ĉiujn Universalajn Kongresojn ekde 1980, eĉ ĉiujn estrarkunsidojn de IFEF ekde 1988. Mi faris multajn fakprelegojn dum IFEF- kaj UEA-kongresoj, en la kadro de la kongresa programo de UEA mi regule aranĝis fervojfakan tagon, foje-foje fakajn vizitojn ĉe iu deĵorejo de la kongresa urbo.

Mi estas responda eldoninto de la revuo

Hungara Fervojista Mondo (HFM) ekde 1984, kaj responda redaktoro ekde 1993. Momente mi estas la gvidanto de la Redaktora Komisiono de IFEF, kiu signifas, ke mi restis estrarano de nia Federacio. Do mia agado en la kadro de la fervojista Esperanto-

movado estis eĉ estas iomete varia kaj abunda. Unu tasko kunportas alian taskon, post unu posteno venis alia posteno.

En la kadro de UIC kaj FISAIC ankaŭ mi agadis iomete longe. La Hungaraj Ŝtatfervojoj (MÁV) en la komenco de la okdekaj jaroj ankoraŭ ne apartenis al FISAIC, kaj en 1982 antaŭ la 33-a IFEF-kongreso okazinta en



D-ro István Bácskai kaj Joachim Giessner

Regensburg, mi traktis kun la generaldirektoro de MÁV, kaj la prezidanto de la Fervoja Sindikato, kiuj komisiis min trakti kun s-ro Schmit, la iama prezidanto de FISAIC, por aliĝi al tiu organizaĵo. La prezidanto kun ĝojo akceptis mian proponon. Ekde 1983 MÁV estas membro de FISAIC, en tiu tempo nur kun la hungaraj fervojistaj esperantistoj, kaj post kelkaj jaroj kun aliaj fervojaj organizoj (folkloroj, skulptistoj, radioamatoroj, korusoj, orkestroj ktp). Dum multaj jaroj mi reprezentis la Hungarajn Ŝtatfervojn ĉe FISAIC, partoprenante preskaŭ en ĉiuj prezidantaraj kunsidoj kaj ĝeneralaj asembleoj.

Rilate al UIC ankaŭ mi havis sperton, ĉar en la sepdekaj jaroj mi gvidis UIC-laborgrupon por la fervojaj koridoroj en Eŭropo, kaj multfoje kaj iomete longe mi laboris en Parizo ĉe UIC. En la kadro de IFEF dum multaj jaroj mi oficiale reprezentis la Terminaran Komisionon de IFEF ĉe UIC. Per mia interveno – helpe de MÁV – mi pretigis, redaktis kaj presigis belaspektajn kaj binditajn dulingvajn naciajn vortarojn pri 13 naciaj lingvoj kaj Esperanto, kiuj aperis en la dua eldono de CD-ROM de UIC. Poste ni kompletigis tiun vortaron kun 6 novaj lingvoj. Tiu rezulto montras la forton de la fervojista Esperanto-movado, kaj la uzadon de Esperanto kiel faklingvo.

3./ Kiel vi prijuĝas vian agadon kiel vicprezidanto de IFEF, kiujn gravajn rezultojn akiris IFEF dum via agado?

La vicprezidanto de IFEF havas multajn taskojn:

- Anstataŭas la prezidanton de IFEF. Tiu tasko estas iomete malfacila devo, ĉar oni ne povas antaŭvidi tion. Ekz. antaŭ unu tago de la 46-a IFEF-kongreso okazinta en Krems (Aŭstrio) mi eksciis, ke la tiama prezidanto de IFEF, Per Engen ne povos partopreni dum la kongreso pro grava malsano de lia edzino. Mi devis tuj verki la festparolon por la inaŭguro kaj reprezenti mian Federacion dum la akcepto de la urbestro, gvidi la komitatkunsidojn ktp.
- Respondekas la agadon de la landaj asocioj de IFEF. Tiu tasko ne signifas nur la pretigon de la resumaj jarraportoj de la landaj asocioj, sed devas – kune kun la ĉefkomitatano – labori por la plibonigo de la agado de la landaj asocioj, instigi ilin organizi lingvokursojn,



En la 57-a IFK en Braŝovo

klubkunvenojn ktp.

- Respondekas pri la faka kaj terminara laboro de IFEF flanke de la estraro. La vicprezidanto devas helpi la agadon de la Faka Komisiono. Pro tio mi devis partopreni dum la fakaj kunsidoj, instigi la fakulojn por agadi sur tiu tereno de la Esperanto-movado.
- Respondekas pri la IFEF-kongresoj flanke de la estraro. La vicprezidanto donas proponon pri la kongresa programo, kontrolas la invitilon



Kun la urbestro de Folkestone en Anglio

kaj aliĝilon, se eblas antaŭ la kongreso vizitas la kongresurbon kaj kongresejon, interrilatas kun la LKK de la koncerna kongreso. Dum la kongreso kontrolas la plenumadon de la deciditaj taskoj ktp.

- Verkas la agadplanon de IFEF laŭ la agadplano de UEA, kaj kontinue kontrolas la efektiviĝon de tiu. Ĉiuj organizaĵoj bezonas iun „gvidfadenon”, laŭ kiu oni laboras. Ne nur IFEF bezonas tion, sed ankaŭ la landaj asocioj. La vicprezidanto devas atenti kaj helpi la efektiviĝon de la taskoj de la agadplanoj flanke de IFEF kaj flanke de la landaj asocioj. Pri tiu laboro mi devis raporti en la komitatkunsido.
- Respondekas pri la kontakto kun UEA. Ne



La estraro de IFEF en Ĉinio

nur la komitatano „A” de IFEF ĉe UEA devas agadi en tiu tereno, sed ankaŭ la vicprezidanto havas taskon sur tiu labortereno. Mi havis facilan eblecon, ĉar mi samtempe estis vicprezidanto kaj komitatano „A”.

●Devas serĉi la eblecojn por fari kunlaborajn interkonsentojn kun la aliaj fakaj organizoj, kaj zorgi la plenumon de la entreprenaj taskoj. Tiu tasko iomete bone sukcesis, ĉar per mia agado IFEF havas interkonsentojn kun UMEA, ISAE kaj ILEI.

Kiel mi prijuĝas mian agadon? Mi ne scias, mi ne povas prijuĝi miajn proprajn agadojn kaj ĝiajn rezultojn. Tio ne estas mia tasko. Tamen mi povas diri, ke malgraŭ la ekonomiaj kaj politikaj problemoj, la fervojista Esperanto-movado ne malboniĝis, eĉ vigliĝis en la lastaj jardekoj. La interrilato kun aliaj fakaj organizoj, la kunlaboro kun UEA kaj kun aliaj Esperanto-organizaĵoj estis kaj kontinue estas ekzemplodonaj. Mi esperas, ke la nova vicprezidanto daŭrigas mian agadon eĉ pli efike.

4./ Vi estas inĝeniero. Kiel vi povas uzi Esperanton sur via faktereno?

Pri tiu demando mi povas doni du respondojn: Kiam mi ankoraŭ laboris ĉe MÁV, mi ege bone kaj efike povis uzi la eblecojn de Esperanto, ĉar mi konatiĝis kun multaj eksterlandaj

inĝenieroj kaj aliaj fakuloj, kun kiuj helpe de Esperanto mi povis ŝanĝi opiniojn, konojn, la diversajn landajn teknikajn novaĵojn kaj raciigojn.

Ekde kiam mi estas pensiulo, mi havas tempon tralegi kaj aŭskulti diversajn fakprelegojn, kaj pere de tiuj mi povas resti en vigleco kaj en bona sanstato. Eĉ tiuj eblecoj helpas al mi pretigi kaj redakti niajn fakajn revuojn (Internacia Fervojisto, Hungara Fervojista Mondo), kies fakrevuoj mi estas la redaktoro.

5./ Dum multaj jaroj vi estis reprezentanto de IFEF ĉe UEA. Kiel vi prijuĝas la fakan agadon de UEA?

Dum pli ol 30 jaroj mi estis komitatano „A” de IFEF ĉe UEA. Tiu tempoperiodo estas tro longa, pro tio mi agadis kun multaj estraranoj de UEA, kiuj estis la respondeculoj de la faka kaj scienca agadoj. Inter aliaj Oszkár Prinz, Petro Chrdle, José Antonio Vergara kaj Amri Wandel estas la plej eminentaj estraranoj. Ĉiuj direktis la fakan agadon alimaniere, sed la celo estis sama: efike uzi la lingvon Esperanto sur la faka kaj scienca terenoj. Ili helpis kaj instigis nin prepari fakajn terminarojn, aktivigis la fakajn organizaĵojn por kunlabori, organizi fakajn prelegojn kaj fakekskursojn, helpi unu la alian ktp. Ili organizis „Terminologian Kunsidon”, „Strategian kaj Fakan Forumon”, „Kongresan Universitaton” ktp. dum la UEA-kongresoj. Pro la diversaj gvidadaj metodoj okazis kelkaj malgrandaj problemoj dum la jardekoj. Ekz. kelkaj estraranoj preferis

la sciencan agadon, pro tio ili havis malmultan tempon por la faka agado, aŭ malgraŭ nia invito kelkaj ne venis al nia faka kunsido dum la kongreso k.a. Tamen mi povas diri, ke UEA subtenis kaj apogis la fakan agadon.

6./ Kiel partoprenanto de multaj kongresoj de IFEF kaj UEA, vi estas rigardebla „mondvojaĝanto”. Ĉu vi povas rakonti kelkajn interesajn travivaĵojn?



Sur la trilanda montopinto ĉe Arnoldstein

Tio estas la plej malfacila demando, ĉar kiel mi jam menciis, mi partoprenis en multaj UEA-kaj IFEF-kongresoj eĉ estrarkunsidoj. Mi atingis de Japanio ĝis Brazilo, de Aŭstralio ĝis Kanado, de Koreio ĝis Kubo, trifoje mi vizitis Ĉinion, kaj kompreneble preskaŭ en ĉiuj eŭropaj landoj mi partoprenis eĉ plurfoje en iu kongreso kaj kunsido. Do mi havas multegajn interesajn travivaĵojn. Mi proponas legi la libron kun la titolo „Mi estis fervoja kuracisto” de D-ro Imre Ferenczy, en kiu li iomete detale skribis pri la Esperanto-travivaĵoj en la tuta mondo, kie kune kun li ankaŭ mi partoprenis. Mi rajtas diri, ke ĉiu vojaĝado, donis al mi iujn novaĵojn, interesajn kaj neforgeseblajn travivaĵojn. Mi konatiĝis kun multaj landoj kaj regionoj, kun la kongres- kaj aliaj urboj, kun diversaj kulturoj, kun moroj kaj kutimoj, kun diversaj homoj. Tiuj vojaĝoj donis eĉ ankoraŭ donas al mi la plej neforgeseblajn eventojn. Tamen inter la plej interesaj travivaĵoj mi povas menciigi Japanion, kie mi vizitis kelkajn famajn urbojn kaj regionojn. Estis la plej interesaj la nenombreblaj kapreoloj kaj cervoj en la urbo Nara, la mondfama „Ora Pavilono” en Kioto, la Toshogu-Sanktejo en Nikko, la Granda Budho en Kamakura kaj la monto Fuji. En Brazilo mi havis du neforgeseblajn travivaĵojn. La unua estis en Rio de Janeiro, kiam ni supreniris per telero al la pinto de monto „Sukerpano”, kaj kiam ni ekrigardis la spirhaltigan panoramon, mia edzino ploris pro la plezuro. Poste ni atendis la sunsubiron, kiu estis nepriskribebla. La alia travivaĵo en Brazilo estis ĉe la akvofalo Iguacu. Tie ni ne povis ekparoli, nur rigardi la miraklon de la naturo. Ni rigardis ankaŭ per helikoptero la tutan mirindaĵon el supro. En Izraelo ankaŭ ni travivis neforgeseblajn eventojn, kiam ni laŭiris la Vojon de Doloroj en Jerusalemo, ni preĝis en la preĝejo de la Naskiĝo en Bet-Lehem, ni naĝis en la Mortamaro, ni faris ŝipveturadon sur la Tiberiada Lago ktp. En Aŭstralio la kongreso okazis en pitoreska urbo Adelajdo, kaj post la kongreso ni aviadis al Sydney, kie estas trovebla miraklo de konstruado, la operejo de Sydney. Dumvoje ni haltis kelkajn tagojn en Singapuro, kie la svisa pureco kaj pedanterio miksiĝas kun la kalifornia pejzaĝo kaj sunbrilo. Poste ni vizitis

Thailandon, kie estas la plej interesaj kaj mirindaj vidindaĵoj, la Granda Palaco en Bangkok, la „Naĝanta Merkato” kaj la fervojponto sur la rivero Kwai en la belega montara regiono de Thailando.

Ĉar mi estis en Ĉinio trifoje, mi vizitis multajn eksterordinarajn interesaĵojn, kiel la Granda Muro, la Ĉiela Altaro, la Somera Palaco kaj la



*István Gulyás transprenas la distingon
“Honora Membro de IFEF”*

Malpermesita Urbo en Pekino, la terakotaj militistoj en Xian, la rokpreĝejoj en Louyang, la pagodoarbaro en Shaolin, la Templo de Jada Budho en Ŝanhajo, la konusformaj montoj ĉe Guilin, panoramo el la Viktoria-pinto en Hongkong, aŭ nia timo, kiam la tajfuno endanĝerigis nian hejmenflugon el Hongkong. En Kubo mi partoprenis en luksa akcepto de la prezidento Fidel Castro, mi naĝis en la maro ĉe la fama banloko Varadero. En Kanado mi loĝis kune kun d-ro Imre Ferenczy ĉe hungardevena geedza paro 25 km-ojn for de la kongresurbo Vankuvero, kaj ili ĉiutage veturigis nin per aŭtomobilo al la kongresejo, eĉ ni faris belegajn ekskursojn al la insulo Vankuvero kaj al la Rokmontaro ktp.

Multajn belegajn travivaĵojn mi havas ankaŭ en Eŭropo, sed tiujn denombri preskaŭ neblas.

7./ Vi kunlaboris kun „grandaj maljunuloj” de la enlanda kaj internacia movado. Pri kiuj el ili vi rememoras volonte?

Mi povus vicigi multajn personojn, kun kiuj mi efike kaj amike kunagadis sur la tereno de Esperanto. Sed tamen mi parolas nur pri du personoj, pri kiuj mi volonte rememoras.

Bedaŭrinde ili jam mortis, sed ili lasis por ni riĉan heredaĵon pri Esperanto.

D-ro István Bácskai, kiu estis mia „patra amiko”, kiu pro lia morto okazigis por ni neanstataŭigeblan perdon. Li enkondukis min al la Esperanto-movado, per saĝaj kaj lojalaj



Antaŭ la inaŭguro en Sofio

konsiloj helpis mian agadon, li ĉiam apogis, patronis kaj protektis min kaj mian laboron, eĉ mian privatan vivon.

Joachim Giessner, kiu – kiel prezidanto de IFEF – helpis kaj kunlaboris por aliĝi nian organizon al FISAIC, helpis al mi dum la kongresoj kaj la estrarkunsidoj. Li intense protektis la hungarajn fervojistajn esperantistojn, kaj li donis al ni ekzemplon por la entuziasma agado sur la tereno de Esperanto.

8./ Dum la IFEF-kongresoj, aranĝitaj en Hungario ĉiam vi havis gravan taskon, plej ofte kiel prezidanto de LKK. Kiel vi rememoras pri tiuj aranĝaĵoj?

En Hungario kvinfoje okazis IFEF-kongreso. En 1962 la 14-a IFK okazis en Budapeŝto. En tiu kongreso mi estis helpanto. Partoprenis pli ol mil kongresanoj, kio estas unika en la historio de IFEF. En la sekvaj kvar IFEF-kongresoj organizitaj en Hungario mi estis la LKK-prezidanto.

En 1982 la 34-a IFK okazis en Balatonfüred. Partoprenis 605 kongresanoj el 23 landoj. Mi estas fiera, ĉar laŭ mia propono la LKK enkondukis specialan iniciaton, laŭ kio propagandcele unu junulo de ĉiu landa asocio

de IFEF senpage rajtis partopreni la tutan kongreson – inkluzive tranoktadon, provizadon, ekskursojn – por allogi junulojn al la Esperanto-movado. Tiu kongreso meritis la titolon: „Kongreso de bonkoreco”.

En 1995 la 47-a IFK okazis en Pécs kun pli ol 300 partoprenantoj. Tiu kongreso tial estas memorinda, ĉar ni volis aliro al la 1100-jara jubileo de la patrujokupo de la hungaroj en 1996, sed pro la manko de anonco por 1995 ni rezignis pri la originala plano, kaj entreprenis tiun efektiviĝon en la jaro 1995. Pro tio la preparlaboro estis streĉa kaj laciga. Sed la kongreso bone sukcesis, plenumis sian celon, kaj ĝi fariĝis: „Kongreso de la komprenemo”. En 2000 la 52-a IFK okazis en Budapeŝto. Partoprenis pli ol 270 kongresanoj. En la kadro de tiu kongreso la organizantoj ĉesigis tiun malbonan praktikon, ke ĉiuj okazaĵoj komenciĝis malfrue. Tiun postulon mi anoncis dum la inaŭguro. Ne nur la kunsidoj komenciĝis precize, sed la aŭtobusoj por la ekskursoj startis akurate. Tiel kelkaj aliĝintoj venis malfrue, kaj ne povis partopreni en la ekskurso. Kelkaj plendis, sed la plej parto de la kongresanoj aplaudis tion. La kongreso ricevis baptonomon: „Kongreso de akurateco”.

En 2004 la 56-a IFK okazis en la urbo Sopron kune organizita kun la aŭstraj fervojistaj esperantistoj. Bedaŭrinde la nombro de la partoprenantoj estis nur 200. Kaj dum la preparlaboro, kaj dum la kongreso ni bonege povis kunlabori kun la aŭstroj, bone sukcesis la komunaj kulturprogramoj, la ekskursoj enlande kaj en Aŭstrio. Do tiu kongreso estis dulanda, vere, ĉiurilate internacia. La estraro de IFEF kvalifikis la 56-an IFEF-kongreson: „Kongreso de la Amikeco”.

Do mi trankvile kaj senmodeste povas diri, ke la IFEF-kongresoj aranĝitaj en Hungario sukcesis bone, kaj donis al la partoprenantoj neforgeseblajn travivaĵojn.

9./ Ekde 1984 vi estas responda redaktoro de HFM. Kiuj estas viaj redaktaj principoj? Kion vi rigardas plej grava tasko de la revuo?

Ĉiu redaktoro havas samajn principojn: pretigi kaj redakti revuon, en kiu la plej gravajn partojn ricevu tiuj artikoloj, pro kiuj oni establis la revuon, sed tamen oni devas

disponigi spacon por aliaj verkaĵoj, temoj, eĉ la revuo estu belaspekta, la artikoloj estu interesaj sen eraroj. Do miaj redaktoraj principoj estas samaj ne nur rilate al HFM, sed ankaŭ ĉe la internacia revuo de IFEF, la „Internacia Fervojisto”, kiun ankaŭ mi redaktas kun la helpo de miaj kunlaborantoj en la Redaktora Komisiono. En HFM mi klopodas aperigi multajn artikolojn pri fakaj, movadaj kaj kulturaj temoj. Se vi trafotomas la HFM-katalogon, vi povas legi, ke inter la aperintaj artikoloj la plej multaj estas el la „movada vivo”, poste sekvas la „faka aktivado” kaj fine la „diversaĵoj” (kulturo, literaturo, lingvo, muziko, sporto, historio, filatelio, ekspozicio, distingo ktp). Grava estas, ke sufiĉajn fotojn ni enmetu en la revuoj, kaj la kvalito estu korekta kaj nivela.

Kion mi rigardas la plej gravajn taskojn rilate al la revuo? Ĉiam ni havu sufiĉajn artikolojn. Bedaŭrinde malgraŭ mia kontinua instigo, la fakgrupoj verkas malmultajn artikolojn pri la vivo de la fakgrupoj. Nur kelkaj membroj, eĉ preskaŭ ĉiam samaj verkas artikolojn. La alia grava tasko estas certigi sufiĉan monon por regule aperigi nian revuon, ĉar la preskosto kaj la sendokosto kontinue altiĝas, kaj la financa apogo de nia asocio kontinue malaltiĝas. Kompreneble mi ankoraŭ povus vicigi taskojn, sed la plej gravaj estas ĉi tiuj.

10./ Kiel prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio kion vi opinias pri la enlanda kaj internacia fervojista movado?

La enlanda fervojista Esperanto-movado montras preskaŭ samajn karakterizajn trajtojn, kiel la internacia movado. La plej granda problemo estas la malkresko de la membro-nombro de la fervojistaj esperantistoj, kaj mi povas konstati, ke dum la lastaj 20 jaroj en ĉiuj jaroj grave malkreskis tiu nombro. Per kelkaj nombroj mi ŝatus konkretigi la situacion:

En 1990 la nombro de la tuta fervojista esperantistaro estis 5550. En 2000 tiu nombro estis 3100, kaj en 2011 nur 1490.

En 1990 la nombro de la IFEF-anoj estis 2021.

En 2000 tiu nombro estis 1067, kaj en 2011 nur 490.

En 1990 la nombro de nia landa asocio estis pli ol 1000, el ili entute 201 IFEF-membroj. En



Estrarkunsido en San Benedetto

2000 ni havis 650 membrojn, el ili 30 IFEF-membrojn, kaj en 2011 ni havis 550 membrojn – kune kun la du aliĝintaj asocioj en Miskolc kaj Tata – kaj el ili 20 IFEF-membrojn.



Dum la inaŭguro de la Amika Renkontiĝo en Hódmezővásárhely

Laŭ mia opinio la kaŭzo de la kontinua kaj malesperiga malkresko estas, ke grave maljuniĝas la fervojista Esperanto-movado, malboniĝas la ekonomia situacio ĉefe nun pro la financa krizo en la tuta mondo, kontinue ŝanĝas la fervojaj organizoj, pro tio grave malkreskas la nombro de fervojistoj, disvastiĝas la angla lingvo sur ĉiu tereno de la vivo, kaj mankas gejunuloj inter la esperantistoj. Do la plej grava problemo estas la senrezulta klopodo por varbi novajn membrojn ĉefe gejunulojn, kaj pro tio neniu volas kaj kapablas transpreni la gvidan taskon en la kadro de IFEF, eĉ ankaŭ ĉe ni. Tamen kaj enlande, kaj internacie la fervojistaj esperantistoj – malgraŭ la multaj malfacilaĵoj –



Dum la ĝenerala kunsido en Budapest

havas esperigajn eblecojn kaj planojn. Bonvolu pensi pri la sekvaj faktoj:

- IFEF ĉiujare organizas kongreson, eĉ okazis kongreso jam ekster Eŭropo;
- IFEF disvastigas la rilatojn, kontaktojn kun aliaj fakaj organizoj;
- UEA dum multaj jardekoj laŭdas kaj rekonas la agadon de la fervojistaj esperantistoj, eĉ helpas organizi la fervojistan kontaktkunvenon dum la UK-oj;
- IFEF kaj ankaŭ nia asocio havas gravan „gvidfadenon” pere de laborplano, do la fervojistaj esperantistoj agadas organizite kaj precize;
- Sur la tereno de la faka agado IFEF laboras rezultohave, multaj fakprelegoj, fakaj organoj, fakaj ekskursoj okazadas kontinue;
- Sur la tereno de la terminara laboro IFEF produktis la plej multajn kaj imponajn rezultojn, eĉ rilate al PIV nia Federacio helpis la plej multe al la redaktoro de tiu internacia vortaro;
- Nenombreblaj ekspozicioj, klubkunvenoj okazas en la kadro de la aktivecoj de la fervojistaj esperantistoj;
- Estas novaĵo, ke nova landa asocio – Kubo – planas aliĝi al IFEF.

Mi povus vicigi la pozitivajn aferojn rilate al IFEF kaj al nia asocio, sed tiuj ekzemploj pruvas al ni pli belan estonton, kaj ni rajtas diri, ke la heredaĵon de niaj antaŭuloj ni gardas, eĉ pligrandigas.

11./ Antaŭ kvar jaroj la estraro de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

kompilis la 50-jaran historion de la hungara fervojista Esperanto-movado. Kion vi povas diri pri la estonta sorto de tiu materialo?

Tiun materialon ĉefe d-ro Imre Pethes kaj János Patay kompilis kun granda atento. Tio estas ĉe mi. Kiam mi havas tempon mi korektas kaj kompletigas ĝin.

La hungara fervojista Esperanto-movado komenciĝis en 1957, la datreveno de nia movado nun jam atingis 55 jarojn. Mi pensas,



Ĉe la monumento de Joachim Giessner en Herzberg

ke ni ne devus kroĉigi al la 50-jara historio. Bedaŭrinde antaŭ kvin jaroj, kiam aktualiĝis la eldono de tiu materialo, ni ne havis sufiĉan monon por presigi tiun. Poste tiu presejo, kiu entreprenis la preson, transformiĝis, ĉesis ankaŭ la preso de nia faka revuo HFM. Mi serĉis novan presejon, kaj trovis pli ol 100 km-ojn for de Budapeŝto, kaj ili ankaŭ donis oferton, sed estas tro alta por nia asocio. Do ni devas atendi kaj kolekti la monon por presi tiun, kaj ĝis la presado kontinue kompletigi tiun.

12./ Kiel vi pensas plifortigi kaj plivastigi la Esperanto-movadon enlande kaj internacie?

Mi pensas, ke mi jam respondis pri tiu demando, sed mi ripetas:

- Senlace kaj entuziasme agadi por Esperanto;
- Serĉi kaj varbi novajn membrojn, ĉefe gejunulojn;
- Organizati allogajn programojn, por ke la intereson de la gejunuloj ni akiru;
- Seninterrompe kaj regule organizati IFEF-

kongresojn, renkontiĝojn, en Hungario Landan Amikan Fervojistan Renkontiĝon;

- Plivastigi la klubkunvenojn kun interesaj kaj variaj programoj;
- Regule eldoni la fakajn revuojn (HFM, IF);
- Kunlabori kun aliaj fakaj organizoj kaj kun instancoj kaj aŭtoritatoj;
- Plibonigi la informadon pri nia movado;
- Organizi lingvokursojn bazgradajn kaj por progresantoj;
- Plivastigi efikan propagandon pri Esperanto.

Do mi ankoraŭ povus vicigi kelkajn farendaĵojn por plifortigi kaj plivastigi la Esperanto-movadon, sed mi pensas, ke tio estas momente sufiĉa.

13./ Kiel toleris vian movadan laboron via familio?

Mia profesia laboro bezonis de mi multajn sindonojn kaj tempon. Mi multe vojaĝis oficiale ne nur en Hungario, sed ankaŭ eksterlande. Do pro tio mia Esperanto-agado malpliigis mian tempon pasigitan hejme. Tamen ĉefe mia edzino subtenis mian movadan laboron, eĉ multfoje ŝi akompanis min al la IFEF-estrarkunsidoj (Danio, Belgio, Francio, Italio k.a.), al kelkaj UEA-kongresoj (Brazilo, Ĉinio, Izraelo), kaj al multaj Landaj Amikaj Esperanto-Renkontiĝoj. Ekde kiam mi iĝis pensiulo, ŝi pli intense

helpis al mi plenigi mian entreprenitajn taskojn en la Esperanto-movado, ĉar per tiu laboro ne dekadencas rapide mia sana- kaj mentala stato. Mia edzino eĉ kontribuas al mia redaktora laboro (HMF, IF) per preparo de ilustraĵoj de la artikoloj.

Tamen mi estas iomete malgaja, ĉar nek mia edzino nek miaj gefiloj volis lerni Esperanton.

13+1./ Kiu estas viaj planoj por la estonta agado por Esperanto?

Antaŭ nelonge mi trapasis la 78-an datrevenon de mia aĝo. Mi jam ne povas, eĉ ne rajtas plani por longa tempo. Tamen mi klopodas kiel eble plej multe utiligi miajn korpajn kaj spiritajn fortojn. Mi volonte agadas kiel prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio, kiel redaktoro de HFM kaj IF, kaj kiel estrarano de IFEF. Do mi ŝatus agadi ĝis kiam mi kapablas. Mi tute ne estas taŭga homo por sidi kaj gapadi antaŭ la televido. Mi preferas la vojaĝadon, aŭskultadon de muziko kaj legadon de diversaj artikoloj kaj libroj. En la kadro de Esperanto mi ŝatus ankoraŭ longe kaj efike agadi sendepende de miaj postenoj. Iam Achim Giessner diris al mi: „mi planas daŭrigi mian multflankan agadon, ĉar tio donas al mi daŭran ĝojon, kaj la ĝojo estas la fonto de energio”. Do ankaŭ mi ŝatus longe ĝoji, kaj pere de ĝojo ricevi energion por plu agadi per Esperanto por Esperanto.

Komentario

Mi pensas la intervjuo adekvate spegulas tiun multflankan, entuziasman agadon, kiu karakterizas s-ron István Gulyás. Ekde longa tempo ni konas unu la alian. Kiam ni ambaŭ estis aktivaj fervojistoj, estis periodo, kiam li estis mia faka gvidanto. Li estis severa, konsekvenca, tamen humana ĉefo. Li havis tre bonan memorkapablon, precize li memoris pri datoj, sumoj, detaloj de kontraktoj. Ĉiam li prepariĝis por traktadoj, ne estis facila tasko diskuti kun li.

En lia agado sur tereno de la Esperanto-movado li praktikis samajn virtojn. Ĉiam efike li laboris kaj en la enlanda kaj en la internacia Esperanto-movado. Li plenumis gravajn taskojn kiel vicprezidanto de IFEF, kaj krom la kutimaj farendoj li havis energion ankaŭ subteni la aferon de nia fakvortaro. Lian plurjaran, rezultohavan laboron atestas la distingo „Honora membro de IFEF” kiun li ricevis en 2009 en Triesto, okaze de tiu kongreso, kiu estis aranĝita en la centjara datreveno de la fevojista movado.

Li estas motoro de nia landa fervojista organizaĵo, gardanto kaj evoluiganto de tiu riĉa heredaĵo, kiun lasis por ni niaj antaŭuloj.

Ankaŭ je la nomo de la legantoj de nia faka revuo mi deziras al li sanon, multe da sukceso kaj ĝojo kaj en la privata kaj en la esperantista vivo.

József Halász

J Á N O S A R A N Y

János Arany estis hungara epika poeto, direktoro de la Societo Kisfaludy, membro kaj sekretario de la Hungara Scienca Akademio.

Liaj gepatroj estis kamparistoj, la suvereno de Transilvanio István Bocskai donacis nobelan rangon kaj bienon al la familio. György Rákóczi la I-a donacis familian blazonon.

János Arany naskiĝis la 2-an de marto 1817 en Nagyszalonta kiel la deka infano de la gepatroj. Inter tre modestaj cirkonstancoj li studis en Nagyszalonta, pli poste en Debrecen.

Komence li okupiĝis pri skulptado, poste helpe de la rekomena letero de lia lernejdirektoro li aliĝis al migranta teatra ensemblo. Post mallonga tempo li forlasis la morale kadukiĝintan trupon kaj hejmeniris al Nagyszalonta. Liaj patrino mortis, la patro blindiĝis, do li devis helpi la familion. Li fariĝis vicintruisto kaj vicnotario de Nagyszalonta. Li geedziĝis kun Julianna Ercsey.

En 1842 István Szilágyi, iama samlernajano kuraĝigis lin por daŭrigi la literaturan agadon, unuavice li konsilis traduki tragediojn de grekaj verkistoj. Je la instigo de Szilágyi li alproprigis la anglan lingvon kaj komencis studi, eĉ traduki la verkaĵojn de Shakespeare.

Lia literatura kariero komenciĝis en 1845 per lia satira eposo sub titolo „La perdinta konstitucio” – je la konkurso de Societo Kisfaludy –, tamen en 1846 li fariĝis vaste konata per la trilogio „Toldi”. La Societo Kisfaludy anoncis konkurson en 1846, en kiu inter ceteraj oni pretendis popoleskan formon. Jen citaĵo el la teksto de la konkurso: „*Estu preparata poeta rakonto; poeme, kies heroo estas iomete historia persono, kaj flugis de buŝo al buŝo de la popolo, ekzemple:*



reĝo Matiaso, Miklós Toldi, bravulo Kádár ktp. La formo kaj spirito estu popola. La limdato de la ensendo estu la 26-a de novembro. Ĝia premio estas 15 pecoj da oro.”

Unue en lia naskiĝloko li aŭdis legendojn pri Miklós Toldi, poste li legis la verkon de Péter Illosvai Selymes, kio donis al li inspiron verki tiun trilogion. La verkaĵo Toldi rikoltis unuaniman venkon, tio gajnis ne nur la anoncitan konkurs-premion, sed ankaŭ la miregon de la ĵurio. – Cetere la Societo altigis la anoncitan premion de „15 oroj” je „20 oroj”. – Samtempe li fariĝis festita poeto, la atento de eminentaj verkistoj turniĝis al li; Petőfi estis lia unua gratulanto.

De tiu tempo daŭre li verkis poemojn por revuoj „Életképek” (‘Vivobildoj’) kaj „Pesti Divatlap” (‘Modgazeto de Pest’), inter ili sub titoloj „Vespero de Toldi” kaj „Sieĝo de Murány”.

En 1848 la Societo Kisfaludy membris lin. Dum la 1848-1849-jara revolucio kaj liberecbatalo li verkis kelkajn poemojn kaj rakontojn por revuoj, kelkajn sociajn poemojn (ekz. „Nemzetőr dal” – ‘Naciogardista kanto’). Dum la 1848-jara revolucio kune kun Gereben Vas li redaktis la gazeton „Nép Barátja” (‘Amiko de la Popolo’); eĉ komence li verkis kelkajn poemojn kaj politikajn artikolojn por tiu revuo.

Post la fiasko de la liberecbatalo dum iom da tempo li devis kaŝvagadi, kaj li ne entreprenis plu publikan rolon. Li reloĝiĝis al Nagyszalonta, kie li disponigis provizoran rifuĝejon por la familio Petőfi. Post la liberecbatalo li perdis sian postenon – ja li estis revolucianto – kaj li fariĝis guvernisto

de la Tisza-Familio en loko Geszt. Estas interese, ke la fiaskon de la revolucio li taksis laŭ du manieroj: elegie kaj ironie.

Ekde 1851 li estis instruisto de la hungara kaj latina literaturoj de la kalvinana gimnazio en Nagykőrös. Post 1856 refoje li povis verki al revuoj, precipe li verkis lirikaĵojn poemojn. Kiel gimnazia instruisto li komencis sisteme studi la hungarajn lingvon kaj literaturon, respektive refoje li legis la pli signifajn eposojn de la mond-literaturo. Li verkis kelkajn eseojn, sciencajn studaĵojn por la revuo „Uj Magyar Museum” (‘Nova Hungara Muzeo’).

La 15-an de decembro 1858 la Hungara Scienca Akademio elektis lin unue sia konsilanta membro, kaj eĉ samtage je plenrajta membro. La 31-an de oktobro 1859 okazis lia inaŭgura prelego sub titolo „Zrinyi és Tasso” (‘Zrinyi kaj Tasso’).

La Societo Kisfaludy en 1860 elektis lin al sia direktoro, pro tio kun sia familio li transloĝiĝis al Pest, kie li fondis la revuon „Szépirodalmi Figyelő” (‘Belliteratura Informilo’), krome en 1965 la revuon „Koszorú” (‘Florkrono’). Arany aperigis multajn artikolojn – pri verkistoj, eseojn pri hungara poeziaĵoj – kaj kritikojn. Lia lirikaĵo la plej multflanke disvolviĝis tiutempe. Profunde li travivis la fremdiĝon de la burĝa socitavolo.

En 1865 lia filino grave malsaniĝis kaj post duonjaro mortis. La morto de la filino kaŭzis netransas-supereblan fin-faran baton. Li komencis verki poemon je la morto de lia filino, sed post la kvara poemlinio li ekhaltis. Anstataŭ daŭrigo li notis la jenan: „Tre doloras! Mi ne povas!” Je la efiko de la familia tragedio ĉe János Arany „eksilentis la poeto”.

La Hungara Scienca Akademio en 1870 elektis lin ĝenerala sekretario, en 1877 li abdikis pri tiu posteno, sed la Akademio ne akceptis.

Pli poste li grave malsaniĝis, lia vidkapablo forte malakriĝis, apenaŭ li vidis. De la fino de la 1870-aj jaroj li pasigis sur la insulo

Margareta, kaj post longa silento refoje li verkis poemojn.

Koncize liaj artaĵoj:

Epika poemaro (Trilogio de Toldi, Kavaliro Pázmány,)

Lirika poemaro („La sklava cikonio”: alegorio por figuri la internan subigitecon; „Mi submetas la liuton: komparas la valorriĉan estinton, valor-malriĉan estanton kaj ironian estonton; „Ciganoj de Nagyida”, „Freneza Steĉjo”: ironika traktado de la revolucio; „En ĝardeno”: ironia ĉagreno pro la fiasko de la revolucio; „Retrorigardo”: memkontrolo de la interna disharmonio; „Sur la deklivo”: Li alfrontigas la valor-malriĉan estanton kaj valor-riĉan estinton;)

Baladoj („Zách Klára”: laŭbloke malkontinua histori-rakonto; „La kimraj bardoj”; „V. László”, Ladislao la 5-a; „Szondi két apródja”, Du paĝioj de Szondi; „Ágnes asszony”, Virino Agneso, spikologia balado; „La eterna Judo”, mikse kunigo de elegia liriko kaj tragika balado; „Patrino de Matiaso”; „Bildo-montradanto”; „Morto de Buda”).

En la plena forto de lia spirito li mortis la 22-an de oktobro 1882 en la palaco de la Hungara Scienca Akademio.

La enterigo okazis en la tombejo Kerepesi la 24-an, posttagmeze je la 13-a laŭ la ceremonio de la kalvinana eklezio. Ĉe la katafalko Pál Gyula (poeto, literatur-historiisto; kritikisto), Károly Szász (dramverkisto, estetikisto, tradukartisto, membro de Hungara Scienca Akademio, kalvinana episkopo); Pál Török (kalvinana pastoro, episkopo) diris funebrajn oraciojn. Pli poste el la insulo Margareta oni transplantis kverkojn al lia tombo.

Okaze de la 195-jara naskiĝ-datreveno kaj la 130-jara morto-datreveno de János Arany ni klinu kapon antaŭ la kreanto de la hungara epiko, liriko, balado, interpretisto de la belliteraturo de la mondo; kaj ne-lastvice de la pura hungara lingvo.

János Patay

JE LA MEMORO DE DONÁT BÁNKI



Donát Bánki naskiĝis la 6-an de junio 1859 en la Nógrád-departementa vilaĝo Bánk, mortis la 1-an de aŭgusto 1922 en Budapeŝt. Siatempe li estis iu plej talenta maŝinĝenero, inventisto, universala profesoro.

Lia patro estis kuracisto, kiu dum la 1848-49-jara revolucio kaj liberecbatalo anonciĝis al la fondanta patrujdefenda armeo, kaj deĵoris ĝis la kapitulacio. Inter la ses infanoj Donát estis la kvara naskito. Kiel universitata studento Donat hungarigis sian familian nomon je Bánki (Bánki, nome ano de vilaĝo Bánk; je la honoro de sia naskiĝloko).

Donát Bánki akiris maŝinĝeneran diplomon en la Teknika Universitato de Budapeŝt. Li dungiĝis ĉe la industrio, en maŝinfabriko de MÁV, pli poste li laboris en la Ganz-fabriko. Du jarojn li estis vicprofesoro de la teknika kaj mekanika katedro de la universitato, kaj poste ekde 1899 universitata profesoro pri hidromaŝinoj, kompresoroj kaj vaporturbinoj.

Lia labortereno strikte interkroĉiĝis kun tiu de János Csonka, kun kiu li evoluigis la t.n. Bánki-Csonka motoron, kio estis internacie konkurkapabla produktaĵo de Ganz-fabriko. Li estis membro de la verkistoj de „Pallas nagy lexikona” (Granda leksikono de Pallas*). La 11-an de februaro 1893 ili kune patentigis la karburilon, inde mondfaman Bánki-motoron; ja per tiu ili antaŭigis la 1894-jaran patentigon de la unua altprema eksplodmotoro de Wilhelm Maybach.

Eĉ pliposte oni aplikis la Bánki-sistemojn de kunpremaltigo kaj akvo-enŝprucigo, kvankam post kelkaj jaroj la apero de la dizelmotoroj malhelpis la disvastiĝon de Bánki-motoroj. En 1917 Bánki inventis la t.n. Bánki-turbinon, kaj ĝi donis novajn vojon por evoluigi la nanajn hidroelekcrejojn. Li prilaboris grandiozan projekton por utiligi la akvoforton de Vaskapu (sur Danubo).

Li fariĝis membro de la Hungara Scienca Akademio. Kvar jarojn post lia morto (1926) oni honoris lin per la „Granda Premio de Hungara Scienca Akademio”. Krom lia maŝinkonstruckia

laboro kaj patentaja aktivado li instruis kun alta konscio. Li tenis sia gravega tasko, ke li akcelu la sciojn de siaj studentoj per lekciaj libroj. Dum sia profesora aktivado li enkondukis laboratorian klerigon ĉe la inĝenera instruado.

En siaj verkaĵoj precipe li okupiĝis pri la doktrino de gasmotoroj, pri la projektaj aksiomoj de la vaporturbinoj kaj hidromaŝinoj („Praktikaj hidraŭliko kaj hidromaŝinoj” [1901-02], „Vaporturbinoj. Kompresoraj maŝinoj” [1903], „Energi-transformiĝoj en fluidaĵoj” [1916], „Neue Wasserturbine” [Novaj akvoturbinoj, 1917], „La projekto de Vaskapu-hidroelektra centralo” [1918], „Mekanismo de piŝtaj pumpiloj kaj kompresoroj” [1932]).

La subaj instruaj institutoj portas lian nomon:

Bánki Donát Mekanika kaj Sekurecteknika Inĝenera Fakultato de la Universitato de Óbuda,

Bánki Donát Trafikmekanika Fak-Mezlernejo kaj Faklernejo;

Bánki Donát Fakinstrua Lernejo Ajka;

Bánki Donát Gimnazio kaj Fak-Mezlernejo Dunaújváros;

Etplanedo nomita pri Donát Bánki „131763 Donátbánki”.

Je lia memoro la „Maŝinindustria Scienca Asocio” en 1955 fondis trigradan teknikan distingon kun honorario „Bánki-memormedalo”, kiun ĉiujare oni aljuĝas. Okaze de lia 150-jara naskiĝ-datreveno la Hungara Nacia Banko eldonis memor-moneron.

Liaj cindroj ripozas en la tombejo Farkasrét de Budapeŝt.

János Patay

**„La Granda Leksikono de Pallas” estas la unua memstara, netradukita hungara grandleksikono, sendube la plej ampleksa verko de la jarcent-turniĝo. La „Pallas Literatura kaj Preseja AS” eldonis en 16 volumoj inter 1893-1897. La pli ol 300-membra verkistaro reprezentis la tutan hungaran scienccon de tiu epoko. Per ĉ. 150.000 artikoloj sukcesis sciencnivele koncizigi la tutajon de la siatempaj konoj.*

FAKAJ INFORMOJ

Strategia kunlabora interkonsento

La „Hungara Turisma AK” (Akcia Kompanio) kaj MÁV Start AK akordigas siajn agemojn por plibonigi la rezultojn de la fremdultrafiko. Okaze de la „Mond-tago de Turismo” (dediĉita tago je turismo de la mondo) Csaba Ungvári (vicgeneraldirektoro de MÁV) kaj Gergely Horváth (generaldirektoro de Hungara Turismo) subskribis kunlaboran interkonsenton. Tiu unuflanke disvastigas la popularigon de la enlanda turismo al la publiko, aliflanke al la internaciaj merkataj celoj. La fervojo havas kreskantan rolon en la turismo: nome tio favora tendenco fariĝis daŭra, ke kontinue kreskas la nombro de la fervojaj pasaĝeroj, eĉ ankaŭ ilia vojaĝdistanco. La celo de la interkonsento estas instigi por pliigi la turismajn enspezojn, kaj kreskigi la pasaĝertrafikon pere de la turismo.

* * *

Modifitaj horaroj

Antaŭ du monatoj komenciĝis grava rekonstrua laboro sur la itinero de Budapest-Esztergom. Sur la 33 km-jn longa zono inter Pilisvörösvár-Esztergom oni rekonstruas la trakon ĝis la fino de 2013. Pro la rekonstrua laboro oni devis modifi la horaron de la pasaĝertrajnoj, respektive oni devis organizi la anstataŭon de la trajnoj per aŭtobusoj. La rezultoj atestas, ke malgraŭ la komplika kaj grava situacio, dum la ĝisnuna rekonstrulaboro senescepte ĉiu pasaĝero aŭ pasaĝergrupo atingis sian vojaĝcelon, nur kelkfoje okazis iom da nesignifaj malfruoj.

Ekde la fino de aŭgusto ĝis decembro okazis pliaj modifoj de la horaro. Inter la stacioj Budapest Nyugati kaj Pilisvörösvár laŭ valida horaro trafikis la pasaĝertrajnoj, inter Pilisvörösvár kaj Esztergom oni plibonigis la teknologion de „bus-anstaŭaĵoj”. En ĉiuj haltejoj la busoj duope aliĝas al la alvenantaj trajnoj, entute 20 kilimatizitaj busoj disponiĝas (14 normalaj kaj 6 malgrandaj – ĉi-lastaj por priservi tiujn haltejojn, kiuj malfacile estas akireblaj per publika vojo).

Post la fino de la rekonstruado altiĝas la nivelo de la fervoja pasaĝertransporto, per la konstruo de P+R (parko kaj veturo plu) resp. B+R

(gardita parkejo) parkejoj oni pli facile povos atingi la staciojn. La itinero inter Pilisvörösvár kaj Esztergom renoviĝos la trako, resp. oni konstruos entute 2 km-jn longajn enstaciajn preterpaso-trakon, oni konstruos novan elektronikan trakregejon, per tiuj efektivigis la kadenchoraro, kaj la rapideco altiĝos de 60 km/h je 100 km/h.

Post la fino de la kompleta rekonstruado – inkluzive la modernigon de 29 km-jn longa zono kun t.n. „Norda Fervoja Danub-ponto”, la veturtempo malpliĝos je unu horo (de 1 horo 40 minutoj).

*

Sur la itinero de Budapest-Székesfehérvár jam estas preta la moderna trako, beliĝis la stacioj, modernigis la ĝiĉetoj. Al tiu investado apartenas la konstruo de la dua trako inter stacioj Budapest-Kelenföld – Érd-alsó – Tárnok. La laboro komenciĝis en septembro kaj daŭros ĝis la mezo de junio 2013. Pro la konstrulaboro ŝanĝiĝis la horaro, la antaŭurbaj trajnoj de Martonvásár trafikis nur ĝis Érd-alsó. Anstataŭ liniolongo de Érd-alsó ĉiu pasaĝertrajno trafikis sur la liniolongo de Érd-felső. Dum la konstrulaboro la haltejo Albertfalva ne funkcias, sed la trajnoj al Székesfehérvár haltas en Budafok, kaj de tie du aŭtobusparoj transportas la pasaĝerojn al Albertfalva. La fervojaj biletoj kaj abonbiletoj validas.

* * *

La fervojo dungos motortrajnestrinojn

Dum la 160-jara historio de la hungara fervojo neniam troviĝis virinaj lokomotivestrinoj, resp. motor-trajnestrinoj.

MÁV kaj GySEV faris pli strikta siajn interrilatojn, ili kongruigas siajn agemojn, reciproke helpas la laboron de unu de la alia. Speciala ŝanĝo okazos en la hungara fervojhistorio: MÁV AK kaj GySEV AK anoncis alvokon por aliĝi je posteno motor-trajnestrino, unuavice el inter siaj dungitoj de ceteraj postenoj, kiuj post 13 monata klerigo povos labori en tiu posteno. Ĉe la tradiciaj lokomotivoj ne eblis tio pro la reguloj de la laborprotekdado, ja kaze de al- kaj diskroĉigo de vagonoj oni devis levi grandajn pezajn

(ŝraŭbokuplilo), sed ĉe la modernaj motortrajnoj – tiuj havas tren/bufra ekipaĵojn – ne bezonas similan pezan fizikan laboron. Je tiuj postenoj oni varbas motor-trajneŝtrinojn.

La aliĝantoj povos komenci la studadon de la motoretra kurso. La aliĝantoj devas finstudi specialan kurson, nome 13 monatojn da studado pri dizel- kaj motor-trajnoestra klerigo, kaj fari ekzamenon.

* * *

Koridoro n-ro 7:

Prága–Bécs–Budapest–Constanta/Athén

Laŭplane daŭras la estigo de la fervoja vartransporta koridoro n-ro 7. MÁV entreprenas gvidan rolon en tiu, per kiu eĉ firmigas sian internacian rolon de Hungario. En nia lando la konkurskapablo signife povos kreski per la akordigo de la priservo de fervoja vartransporto en sep landoj.

MÁV AK organizis fondi du gravajn konsilantajn kolektivojn koncerne la vartransportan koridoron n-ro 7. En oktobro fondiĝis konsilanta kolektivo por firmigi la fervojkompanion posedanton/funkciiganton de la estigo de la koridoro n-ro 7 (Prága – Bécs/Pozsony – Budapest – Bukarest – Constanta resp. Prága – Bécs/Pozsony – Budapest – Vidin – Szófia – Thessaloniki – Athén) kaj funkciigon ekde novembro 2013. Hungario havas gvidan rolon ĉe la elformigo de la koridoro n-ro 7, krom direktado de la afergvida korporacio Hungario plenumas ankaŭ la farenadaĵon de la sekretariato.

La celo de la elformigo kaj estonta funkciigo de la koridoro estas fortigi la kunlaboron inter la membroŝtatoj kaj funkciiganto de la fervojreto, krome akordigi la evoluigojn kaj investadojn. Krome tiu devas akordigi la optimalan uzadon de la fervojreto, funkciigi la terminalojn, krei harmoniajn regulojn laŭ nivelo de Eŭropa Unio, racie manipuli la kapaciton kaj akordigi la trafikregulojn.

Laŭ la preskribo de la Eŭropa Unio oni devas estigi internan fervojan merkaton, precipe sur la tereno de la vartransporto. La estigo de la internaciaj koridoroj plibonigas la kondiĉojn de la uzata

infrastrukturo, servas la konkurskapablan vartransporton, rezervas konformajn kondiĉojn al trafiko de la vartransporto kaj ebligas senprobleme trairi el iu internacia reto al alia. Oni devas akordigi la eŭropajn internaciajn fervojajn vartransportajn koridorojn kun la transeŭropaj trafikaj retoj (TEN.T) kaj/aŭ kun la koridoroj de la eŭropa fervoja trafikregula sistemo (ERTMS).

* * *

500 oficistoj por plibonigi la liveradan nivelon

La gvidantaro de MÁV publikis alvokon – unuavice al la oficistoj – por fari memvolan laboron precipe en la ĉefurbaj stacioj, resp. en la haltejoj de la antaŭurbaj linioj. Ilona Dávid, la generaldirektoro de MÁV deklaris: „la funkciigo, evoluigo de la fervojo ne estas nure financa temo, mia opinio multaj taskoj estas solveblaj sen mono. Ni fervojistoj kapablas kune akiri sukcesojn, ni devas koncentri niajn fortojn por la evoluigo de niaj liveradoj...” Je la alvoko aliĝis 500 dungitoj, kiuj en oktobro unu tagon laboris en stacioj, metis ordon po 10-12 membraj grupoj.

* * *

Paŝoj por altiri la vartrafikon al la hungara fervojreto

En septembro okazis la plenkunsido de la 'Kunordiga Konsilantaro de Transsiberia Vartransporto', kiun partoprenis la reprezentantoj de 113 entreprenoj el 24 landoj; inter ili ankaŭ hungara nacia delegacio. Dum la aranĝaĵo Ilona Dávid, la generaldirektoro de MÁV speciale traktis kun la prezidanto de la 'Rusaj Fervojoj'. Ili konsentis prilabori memorandon por evoluigi la hungaran-rusan fervojan kunlaboron. La du fervojkompanioj – je hungara propono – prilaboros serion de aranĝoj por pli intense eluzi la transigajn kaj logistikajn eblecojn de Hungario. Flanke de la hungaroj Ilona Dávid persone direktas tiun ĉi laboron.

La tasko de la 'Kunordiga Konsilantaro de Transsiberia Vartransporto' – inter ceteraj Japanio, Ĉinio, Koreo – estas pliigi la volumenon de la fervojaj frajtadoj per la transsiberia itinero inter Azio kaj Eŭropo.

Kompilis: **János Patay**

SPIRITAJ DESERTOJ

Ekonomiko – Ekonomia krizo

Rusa turisto alvenis al montara hotelo kaj demandas: „ĉu vi povas rezervi ĉambron por mi? – kaj sur la akceptostablon metas bankbileton en valoro de cent Eŭroj.

La posedanto de la hotelo ekĝojis, ja lastatempe la negoco tre stagnis; li transdonis la ŝlosilon de la plej eleganta ĉambro. La gasto ekiris sur la ŝtuparo por okupi la luitan ĉambron.

La posedanto kaptis la bankbileton, li kuregis al la najbara buĉisto por egaligi sian antaŭsemajnan ŝuldon, kaj reiris al la hotelo.

La buĉisto kaptis la bankbileton kaj kuregis al la kamparisto por egaligi la prezon de la kredite aĉetita porko kaj reiris al sia viandovendejo.

La kamparisto tuj kuris al la ĉiesulino por egaligi siajn servojn kaj reiris al la farmo.

La ĉiesulino kuregis al la hotelo por egaligi sian ŝuldon, nome la prezon de pasintsemajne luitaj hotelĉambroj kaj metis la centeŭro-bankbileton kaj hejmeniris.

Efektive neniu faris nenion, tamen ĉiu egaligis sian ŝuldon.

Jen tiom pri la ekonomiko kaj pri la ekonomia krizo.

Kompilis: **J. Zelota**

Bedaŭrinda edzo

Foje simpla viro tre laciĝis pro la ĉiutaga laboro. Ĉiutage li iris labori, sed lia edzino nur “nenifaris hejme, nur ripozis”. Li estus dezirinta, se lia edzino ekscius kion li devas travivi de tago al tago. Pro tio vespere li preĝis tiel:

“Mia ĉiopova Patro! Ĉiutage mi iras labori, ĉiutage streĉege mi laboras ok horojn, dume mia edzino ripozas hejme. Mi dezirus, se eĉ ŝi ekscius kion mi devas ĉiutage travivi, pro tio mi petegas vin por ke ni povu ŝanĝi korpon je unu tago. Amen.”

Alitage la edzo vekigis en virina korpo. Ŝi ellitiĝis, preparis matenmanĝon al sia edzo, vekis la infanojn, preparis iliajn ĉiutagajn vestaĵojn, preparis matenmaĝon al ili, pakis iliajn intertagajn

manĝetojn, akompanis ilin al la lernejo, hejmeniris, rapide akvumis la florojn, preparis kaj ekfunkciis la lavmaŝinon, kolektis kaj purigis la malpurajn, hieraŭ uzitajn dismetitajn ŝuojn de la infanoj, kolektis la malpurajn vestaĵojn kaj forportis tion al la lavejo, ekhaltis ĉe la banko por elpreni monon, egaligis la fakturojn, aranĝis la ĉekokajeron, poste aĉetis en la nutraĵvendejo, alveninte hejmen ŝi purigis la kuŝpajlaĵon de la kato kaj banis la hundon.

Jam estis la 13-a horo, kiam finfaris la vicigitaĵojn, ŝi devis rapidi por aranĝi la litaĵojn, fari ordojn en la loĝejo, finfari la polvosuĉadon, lavi la plankojn de la banĉambro kaj kuirejo, ŝi tuj kuregis al la lernejo por hejmen-akompani la infanojn, dumvoje diskuti pri la preparo de la hejmtaskoj. Alveninte hejmen ŝi servis kukon kaj lakton sur tablon por la infanoj, poste agitis ilin por studi la lecionojn. Ŝi prenis la ilojn por glitigi la lavitajn-sekiĝintajn teksaĵojn. Poste komencis senseligi la terpomon, lavi verdaĵojn por prepari salaton. Ŝi fritis la viandon, eĉ ŝi stufis iom da verdaj fazeoloj kiel garnaĵo por vespermanĝo.

Post vespermanĝo ŝi purigis la kuirejon, ekfunkciigis la teler-lavmaŝinon, relokigis la purajn vazojn, banigis kaj enlitigis la infanojn. Je la vespera 9-a horo ŝi estis tre laca. Kvankam ankoraŭ ŝi ne finfaris la tagan laboron, tamen ŝi enkuŝis liton, kie la edzo pretendis de ŝi amori; sen plendo ŝi faris.

Alitage kiam ŝi vekigis, ŝi tuj genuiĝis apud sian liton kaj preĝis jene:

„Mia ĉiela Patro! Mi ne scias je kio mi kalkulis. Mi konfesas, ke mi eraris kiam mi enviis mian edzinon, ĉar dum la plena tago „ŝi povas ripozi hejme”. Mi petas, petegas, ke ni reŝanĝu la tutan aferon!”

Kaj Dio kun sia ekstrema saĝeco respondis:

„Mia filo, vi ellernis la lecionon, kaj mi ĝoje reŝansas la aferojn laŭ tiu formo, laŭ kio originale vi estis. Sed vi devas atendi ankoraŭ naŭ monatojn. Hieraaŭ vespere vi gravediĝis.”

Kolektis: **G. Temesvári**



Gracoplenan Kristnaskon kaj feliĉan novan jaron!



La 65-a kongreso de IFEF kaj la kongreso de UFE okazos de la 4-a ĝis la 11-a de majo 2013 en Francio en Artigues-pres-Bordeaux. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio